


Tria (3-a) leciono.



La fiŝo naĝas
en la akvo.

Ĉu la fiŝo naĝas en vino? Ĉu vi sidas en akvo? En kio naĝas la fiŝo? Ĉu vi naĝas? Ĉu la naĝo estas sporto? Ĉu la akvo estas varma? Ĉu la kafo estas bona? Ĉu vi naĝas en *varma* akvo? Kio naĝas en *malvarma* akvo?

Ĉu ni dormas? (Ne, ni *lernas*.) Ĉu la instruisto lernas? (Ne la instruisto *instruas*.) Ĉu ni sidas? Kiu instruas? Kiu lernas? Ĉu ni sidas sur la *planko*?

Ni = mi + vi.

Ĉu ili dancas? Ĉu ili manĝas? Ĉu ni parolas? Ĉu ili sidas? Ĉu ili parolas?

Li, ŝi, ĝi (singularo).

Ili (pluralo).



2 (du) sinjorinoj.
Ili parolas.

Ĉu 1 (unu) sinjorino parolas?

Ne, *du* sinjorinoj parolas.

Ĉu la bestoj parolas? Ĉu sur la tablo estas *libroj*? Ĉu la paperoj kuŝas sur la seĝo?

Kiu parolas? Sinjoro parolas.

Kiuj parolas? Sinjoroj parolas.
Sinjorinoj parolas.

1, 2, 3, 4, 5 = *unu, du, tri, kvar, kvin*.

Ĉu kvin libroj kuŝas sur la tablo? Ĉu kvar seĝoj staras sur la planko? Ĉu tri sinjoroj lernas? Ĉu du bildoj pendas sur la muro?

La libro kuŝas sur la tablo. La seĝo staras sur la planko. Mi sidas sur la seĝo. La bildo pendas sur la muro.

Kie kuŝas la libro? (*Sur* la tablo.) Kie staras la seĝo? Kie vi sidas? Kie naĝas la fiŝo? Kie dormas Adamson? Kie vi dormas? Kie vi skribas?



Blanka.



Nigra.

Ĉu la sinjoro estas blanka? Ĉu la papero estas blanka? Kiu estas blanka? Kiu estas nigra? Kio estas nigra? Ĉu la sinjoro estas nigra? Kie estas la nigra libro?

Ĉu la ĉokolado estas blanka? (La ĉokolado estas *bruna*.) Ĉu la seĝo estas bruna? Ĉu vi estas bruna? Kiu estas bruna? Kio estas bruna? Ĉu la tablo estas blanka?

Ĉu la elefanto estas blanka? (Ne, *griza*.) Ĉu vi estas griza? Ĉu la tablo estas griza? Kio estas griza? Ĉu la muro estas griza?

Ĉu la kanario estas griza? (Ne, ĝi estas *flava*.) Ĉu la floro estas flava? Ĉu vi estas flava? Ĉu la papero estas flava? Ĉu la japanoj estas flavaj? Ĉu la avedoj estas blankaj? Ĉu ili estas *blondaj*? Ĉu vi estas blonda? Kiu estas blonda? Ĉu Greta Garbo estas bruna? Ĉu Anny Ondra estas nigra? Kiu estas flava?



Domo.

Ĉu la domo estas flava? Ĉu vi estas ruĝa? Ĉu Ruslando estas ruĝa? Ĉu la aŭtobuso estas ruĝa? Kio estas ruĝa? Ĉu la kanario estas ruĝa? Kie estas la libro? Kie kuŝas la blanka papero?

Kio estas blua? Ĉu la muro estas blua? Ĉu la elefanto estas blua? Ĉu la ĉokolado estas blua?



Stelo.

Kie estas la steloj? (Sur la ĉielo.) Kie estas la verda stelo? (Sur la esperantisto.) Ĉu vi estas perfekta esperantisto? Kiu estas perfekta esperantisto? Ĉu la libro estas verda? Ĉu la muro estas verda? Kio estas verda? Kio estas blua? Kio estas bruna? Kio estas nigra? Kio estas blanka? Kio estas griza? Kio estas ruĝa? Ĉu la ĉielo estas nigra? Ĉu la blua ĉielo estas granda?



Nigraj — libroj.

Ĉu ni estas blankaj homoj? Kiu estas blankaj homoj? Ĉu la negroj estas flavaj homoj? Ĉu en Svedlando estas belaj sinjorinoj? Ĉu la grizaj elefantoj estas grandaj? Ĉu la musoj estas ruĝaj?



Maljuna



Juna.

Ĉu vi estas juna? Ĉu la junaj homoj amas? Kiu amas? Kiu estas juna? Ĉu Selma Lagerlöf estas juna?



Li amas ŝin.

La juna homo amas kaj parolas (diras):

Fraŭlino, mi amas vin! Ĉu vi amas min?

La fraŭlino diras: Jes, mi amas vin! (Ili amas.)

La sinjoro amas ŝin. La fraŭlino amas lin. Ili estas feliĉaj. La feliĉa homo ridas, la malfeliĉa homo ploras.



Li kisas ŝin.
Ŝi kisas lin.

Ĉu la sinjoro kisas min? Ĉu li kisas ŝin? Ĉu vi rigardas min? Ĉu la sinjoro rigardas min? Kiu instruas vin?



La malbona homo batas ĝin.


Ĉu li estas bona homo? Ĉu la hundo ridas? Ĉu la malbona homo manĝas ĝin? Kiu batas ĝin? Kiu venas?

Mi.....Min
Vi.....Vin
Li.....Lin
Ŝi.....Ŝin
Ĝi.....Ĝin
Ni.....Nin
Vi.....Vin
Ili.....Ilin



Adamson batas lin.

Ĉu la malbona homo batas? Ĉu Adamson estas bona homo? Ĉu Adamson batas ĝin? Kiu batas lin? Ĉu la hundo bojas? Ĉu la hundo rigardas ilin? Kio rigardas ilin? Ĉu la malbona homo batas? Kiu estas bona?



Ĉu Adamson estas bona homo? | Adamson iras? Kiu kuras post
Ĉu la hundo estas bona? Ĉu | Adamson? Ĉu la hundo kuras post

la kato? Ĉu la kato kuras post la muso? Ĉu Adamson ridas? Ĉu Adamson estas feliĉa? Ĉu la hundo amas lin? (Ne, la hundo malamas lin.)

Ĉu Esperanto estas bona? Kiu lernas ĝin? Ĉu la ruĝaj domoj estas belaj? Ĉu vi rigardas ilin? Ĉu

la bifesteko estas bona? Ĉu vi trinkas ĝin? Ĉu la fraŭlino estas bela? Ĉu vi amas ĝin? Ĉu la lernanto estas bona? Kiu instruas lin? Kiu instruas vin? Ĉu la Adamsonbildoj estas interesaj? Ĉu vi rigardas ilin?

Sinjoro, sinjorino, mi diras:
Adiaŭ! Ĝis revido!